

Núm. 7

JULIO 1949

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

PERSISTENCIA

La fuerza difusiva del movimiento esperantista es bien patente. Nacido en Polonia y expuesto primeramente a los rusos, por razones de vecindad y de conveniencia propagandística, son, sin embargo, los intelectuales franceses los que lo adoptan con latino entusiasmo y dan al Esperanto ese sello de madurez y ponderación que le acompaña desde sus primeros años, y que ya nunca le habrá de faltar.

Cuando se organizó el primer Congreso Internacional Esperantista de la postguerra, que tuvo lugar en Agosto del 47, en Berna, se consideró la cosa como casi irrealizable. Europa todavía humeante; el estado económico desastroso en la mayoría de los países; prohibiciones extensivas a vencedores y vencidos; recelos y odios feroces entre próximos vecinos; todo hacía suponer un fracaso rotundo para el primer congreso que se atreviese a desafiar tan poderosos obstáculos. Sin embargo, los vaticinios no se cumplieron y el Congreso de Berna fué un éxito moral y material para el Esperanto. Cerca de dos mil congresistas pertenecientes a los más diversos países, atestiguaron la firmeza e inmortalidad del idioma e ideario de Zamenhof; si no hubiese sido por las dificultades económicas y las trabas fronterizas, hubiesen pasado de cinco mil los asistentes a la magna concentración mundial del esperantismo.

El año pasado volvió a repetirse el hecho en Malmö, confirmándose la firmeza y extensión del movimiento esperantista en todo el mundo. Este año es Inglaterra, el propio país que tanto pugna por hacer triunfar su idioma como lengua universal, quien albergará a los representantes de más de treinta países, que, en embajada de paz y fraternidad, volverán a demostrar ante el mundo entero que el Esperanto es una lengua viva, una solución para el problema idiomático, un puente de paz para los pueblos, y para muchos todo un ideario moral.

Desgraciadamente, no serán tan numerosos los asistentes a ese Congreso como los que de corazón quisieran tomar parte en él. ¿Quién puede vencer, hoy día, las barreras casi infranqueables que se llaman pasaporte y divisas? ¿Quién puede, en las actuales circunstancias, dejar la dura brega diaria, para perder ingresos, aunque sea para tomar un baño vivificador de sana fraternización mundial?

El éxito del inminente Congreso consistirá en su organización, en la periodicidad de su convocatoria, en la diversidad de procedencia de los congresistas, en la perfecta comprensión de los mismos por medio del Esperanto, en la unanimidad de las decisiones, en el ambiente fraterno que se producirá entre sus componentes, y en el hálito de apoyo de millones de esperantistas que, desde los más diversos rincones del mundo, estarán en espíritu en Bournemouth, ya que no pudieron lograr la suprema felicidad de vivir durante unos días en «Esperantio», meta y anhelo de todo aquel que aprendió el idioma internacional para usarlo y practicarlo.

Como avanzadillas de esa magna concentración esperantista, han tenido lugar, durante las fiestas de Pentecostés, que alcanzan en el extranjero más resonancia que en España, diversos Congresos nacionales de esperantistas, a los que, ayudados por la poca extensión de algunos países, han podido asistir, por todos los medios posibles de locomoción, muchos esperantistas procedentes de países limítrofes. De esa manera, muchos han podido ofrecerse el gusto de vivir durante dos días en un ambiente, internacional por el origen de sus componentes, pero maravillosamente unificado por la idea y el idioma. Así, ha sido espléndido el Congreso alemán, a pesar de la escisión del país en dos grandes mitades, y que demostró el profundo arraigo y la vertiginosa difusión del idioma internacional en el país germano. No menos cordiales y demostrativas han sido las reuniones celebradas en los países escandinavos y en los Países Bajos. De esa manera, los que no pueden asistir al gran Congreso en Bournemouth, han vivido unos pocos días en el ambiente ideal esperantista, y han demostrado a todo el mundo que, en medio del actual océano de recelo y hostilidad, existe una isla de paz y mutua comprensión, iluminada por la estrella refulgente del esperantismo.

Desde estas columnas, enviamos al Congreso de Bournemouth el fraterno saludo de los esperantistas españoles y nos honramos aportando nuestra unánime adhesión al clamor de paz y comprensión que, por medio del Esperanto, no dejará nunca de oirse, anualmente, en una parte cualquiera de nuestro desquiciado mundo.

GEEDZIĜO EN MAROKO

Tetuan, ĉefurbo de la hispana zono en Maroko, brulas en festoj. Lia Princa Moŝto Mulej Hassan Ben-el-Mehdi, jus edziniĝis al si Princinon Lal-la Fatima, filino de la iama imperiestro Abdelazis, kaj la maroka popolo arde partoprenas la feliĉon de sia amata Ĥalifo. Ĉiuj sociaj klasoj fervore sin donas al ĝojo kaj amuzo, kaj la maroka fantazio senbride fluas en la tetuana medio. Geedziĝo en Maroko estas tute aliaspekta ol en Eŭropo, kaj la brileco de la evento dependas, kompreneble, de la riĉeco de la respektivaj familioj. Kiam, kiel nun okazas, temas pri reĝa geedziĝo, la afero fariĝas preskaŭ fabela en riĉkolora sinsekva ĉeno da mirindaj festoj, kies ĉeesto estas por okcidentano neforgesebla travivaĵo. Estas nevera aserto, ke ekzistas speciala rito mahometana por reĝaj edziĝoj. La Korano, fundamenta libro de l'Islamo, havas ununuran regulon tiurilatan. Nur ekzistas diferenco inter la laikaj festoj okazantaj ĉirkaŭ la religia ceremonio, sed ili estas afero tute aparta de la strikte religia kunligiĝo. La «buja» (geedziĝofesto) daŭras kutime de dek ĝis dudek tagoj. En Maroko, ĝenerale, ĝi ne daŭras pli ol dek tagoj, kaj nur riĉaj nobeloj celebras ĝin eksterordinare lukse. Dum tiuj tagoj feston sekvas festo, kaj ilin partoprenas geparencoj kaj geamikoj de ambaŭ familioj. La unua akto de la «buja» estas la tiel nomata «keñotba» (svato, manpeto) kiu ĉiam okazas ĉe la gepatroj de la fianĉo, kien venas familianoj de la geedziĝontoj. Tie, antaŭ la «kadi» (juĝisto) kaj atestantoj oni difinas kontrakte la dotoน de la fianĉino. La «sdak» (kontrakto) estas ofte miskomprenata, kredante multaj, ke ĝi estas vera aĉeto de la virino. Efektive temas pri tute alia afero, nome : simpla ekonomia garantio pri eventuala memsubteno de la edzino en kazo de separo, kio ĉe islamanoj estas relative facila afero. Ok tagojn antaŭ la geedziĝo, ankaŭ ĉe la fianĉo, oni celebras la «aajin», (dolĉfesto), dum kiu oni preparas manĝaĵojn kaj sukeraĵojn por la venontaj tagoj. Kvin tagojn poste, la gepatroj de la fianĉo regalas tiujn de la fianĉino per teo kaj dolĉaĵoj, okaze de la «suar» (akcepto de la fianĉina vestaro) kaj du tagojn poste, nun ĉe la fianĉino, okazas la «henna» (festo de la virinoj) kiuj nur ĉi tiuj partoprenas. Dum la «henna», la ĉeestantinoj ŝmiras siajn manojn per vegetalaj farboj. Estas kutimo, ke la fianĉino stampu la konturon de sia mano sur muron, kiel simbolo de la mano de Fatima, la filino de Profeto Mahometo. Unu tagon antaŭ sia edziniĝo, la fianĉino regalas siajn amikinojn per festo, kie regas junuleca bonhumoro kaj amuzsento. La «nevica» estas certagrade simila al nia adiaŭo al fraŭleco. Kaj fine venas la «lej-let zifaf», la sopirata geedziĝonokto, en kiu la fianĉino estas kondukata al la edzo per lukse ornamita «amaria» (palankeno). Vestita per siaj plej belaj roboj kaj ĉirkaŭata de torĉoj kaj muziko, oni portas ŝin triumfe en ŝian novan hejmon. «Sabah» kaj «mensi» estas la sekvantaj festĉeneroj. Dum la unua, la virinoj liveras siajn donacojn al la ĵusa edzino. La «mensi» estas la unua tago, kiun la geedzoj pasigas solaj. Se la edzo eliras en la straton en tiu tago, li montras malestimon al sia edzino. La trian tagon post la «lej-let zifaf», okazas ĉe la fianĉo la «malakja», dum kiu parencoj kaj amikoj regalas la edzon per plej diversaj donacoj.

Kvar tagojn poste, ĉe la gepatroj de la edzo, estas celebrata «sahah» ; tio estas familieca festo. Kaj la afero finiĝas per «ĉahjir aaser» (mielluno), la tagoj kiam la geedzoj. kiel ĉe ni, foriras plurloken en plezura vojaĝo. Poste trankvilo regas denove ĉe la kelktage senĉese festintaj familioj, kiuj abunde manĝis, trinkis, dancis, kantis kaj amuziĝis. La nova paro da geedzoj komencas sian ordinaran vivon... kaj estas tre malfacile aŭguri, kiom da tempo pasos ĝis la unua hejmobatalo!

ETULO

Esperanto estas granda fenestro, vaste malfermita de ekstremo al ekstremo, kie la varia spektaklo de la tuta mondo estas facile kaj komforte rigardata

EL ESPERANTO Y LA TELEVISION

Ha sido en Holanda donde ha tenido lugar la primera prueba de un programa completo de televisión en Esperanto. En el bello país de los tulipanes, el idioma auxiliar internacional goza de una enorme difusión y de un merecido prestigio. Aparte de ser conocido y hablado correctamente, en extensos núcleos de población de todas las ciudades holandesas, hay que resaltar el hecho del gran número de esperantistas que hoy ocupan cargos rectores en la vida pública de este país; es precisamente el doctor W. Drees, actual Jefe del Gobierno de Holanda, quien desde su elevado cargo, tan lleno de responsabilidades, tiene a gala el hacer ostensible su cualidad de antiguo y fervoroso esperantista. Para los servicios de la nueva Agencia de Información «Esperanto-Press» ha redactado él mismo varios artículos relacionados con los problemas más importantes de la política holandesa. Es la primera vez que un esperantista usa el Esperanto como Jefe de Gobierno. No es de extrañar, pues, que las entidades y organismos más importantes de la nación, sigan el ejemplo de su primer ministro admitiendo en todas sus actividades este maravilloso instrumento de la cultura moderna. La Casa Philips, famosa distribuidora en todo el mundo de material eléctrico y aparatos de Radio, ha instalado en Holanda la primera estación de televisión, que funciona ya regularmente emitiendo programas variados tres días a la semana. Los programas consisten en funciones teatrales, fragmentos de películas, variedades, charlas instructivas y demostraciones científicas.

Una gran alegría recibieron los esperantistas holandeses al saber la noticia de que el Instituto Esperantista de La Haya había sido invitado para hacer una emisión recreativa acerca del Esperanto. Previos los acuerdos pertinentes para la confección del programa, la prueba ha constituído un éxito lisonjero y esperanzador como lo demuestra el informe oficial de la Dirección, redactado en los siguientes términos: «La emisión en Esperanto ha sido altamente apreciada; los juicios que ha merecido del público puedan resumirse así: EXTRAORDINARIAMENTE INSTRUCTIVA. MUY INTERESANTE. LA TELEVISION SIRVE MAGNIFICAMENTE PARA ESTOS FINES».


El programa se dividió en dos partes; primero se ofreció una conversación entre la señora Julia Isbrucker, esposa del Presidente de la Academia Esperantista, y un repórter. Aparecía esta señora en animada charla con el periodista Sjoerd De Vrij acerca de las ventajas del Esperanto y de su fácil aprendizaje, a lo cual el periodista aparentaba desconfiar. A continuación, como en una película, se producía una rápida mutación, apareciendo en primer plano, la simpática y persuasiva figura del reverendo padre Andreo Cseh, el conocido sacerdote, creador del sistema llamado «rekta metodo» que consiste en enseñar el Esperanto a viva voz, por medio de demostraciones prácticas, a base de objetos elementales. Con las pacíficas armas de una manzana, un enorme lapicero y varios simpáticos animalitos de trapo, sobre el fondo escolar de una pizarra, el profesor explicó a su invisible auditorio la primera lección, visible a larga distancia, de su eficiente y utilísimo sistema, tan popular entre los esperantistas de todo el mundo. La lección terminó poniendo el señor Cseh su propia insignia esperantista sobre la solapa del periodista, cuando éste reconoció complacido las insuperables ventajas del idioma internacional. Así pues, en el campo todavía casi inexplorado de la televisión ha logrado el Esperanto una formidable victoria inicial que hace resaltar más aún las que está logrando, con positiva firmeza y unánime aceptación, en el terreno de la radio, a través de las tres potentes estaciones europeas que emiten diariamente sus programas en este sonoro lenguaje de los tiempos modernos.

Los esperantistas españoles felicitamos muy sinceramente a los amigos de Holanda y agradecemos a la Casa Philips la fineza que dicha emisión representa, esperando que se repitan esta clase de programas, donde se funden los adelantos de la técnica más reciente con la generosa y noble aspiración de que los hombres de todo el mundo, sea cual fuere su propio idioma, puedan entenderse perfectamente, directamente y... fácilmente.

DOS INTERESANTES MOMENTOS DEL PRIMER PROGRAMA DE TELEVISION EN ESPERANTO



La señora Julia Isbrucker y el periodista señor Sjoerd hablando de las ventajas del Esperanto...



...Y el popular profesor señor Andreo Cseh demostrando a viva voz lo fácil que es aprenderlo.

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

En ĉi tiu sezono, la tutmonda samideanaro ne povas ne senti la tikladeton de diversaj emocioj. Temas unue pri la feliĉaj geamikoj, kiuj ekpakas kofrojn kaj valizojn, vivante jam per la penso en tiuj belaj urboj, kien ili baldaŭ sukcesos veturi por aktive partopreni en la agrabla medio de la internaciaj kongresoj en Bournemouth kaj Parizo. Tiuj urboj, dum kelkaj proksimaj tagoj, fariĝos centraj altirlokoj, kie gaje rendevuos la esperantistoj, kiuj povas vojaĝi, en akompano de la spirito de tiuj aliaj, kiuj domaĝe ne tiel sukcesis trabati la maŝojn de oficialaj formalaĵoj kaj... la krizon de poŝoj tro malplenaj. Se ne sankta devo, kiel ĉe la islamanoj, kiuj devas foje en sia vivo fari pilgrimon al Meko, estas ja supera kaj tre dorlotita iluzio, de ĉiu bona esperantisto, sperti almenaŭ unu fojon la neforgeseblajn travivaĵojn en tiu kadro mem de la impona manifestacio, kiun ĉiujare arangas, antaŭ la ĝenerala publiko, la organizita movado de nia lingvo. Tie oni diskutas en seriozaj debatoj, oni prelegas faklerte kaj oni babilas hejmece, oni ĝojas en kolektivaj ekskursoj kaj oni brue amuziĝas en dancoj aŭ baloj, kaj... eĉ oni konjugacias diligente, laŭ la plej rekta metodo, la estantan kaj estontan tempojn de la transitiva verbo ami... Prave oni povas aserti do, ke ĉiuj esperantistoj nepre dividiĝas je du klasoj: tiuj, kiuj vizitas aŭ ne vizitas la internaciajn kongresojn. Bedaŭrinde, ĉar mi apartenas al ĉi tiu lasta kaj pli abunda kategorio, restas al mi nur la modesta rimedo deziri plenan sukceson al la tuj okazontaj kongresoj, kaj grandan kvanton da plezuro al ĉiuj gekongresanoj senescepte. Por iomete min konsoli, ankaŭ mi faros vojaĝon; jes, provizore mi forlasos la arbaron kaj venos ĝis la bordo de la maro, kie ne aŭdiĝas la karesa susuro de moviĝema foliaro, sed la brava muĝado de la ondoj, en daŭra kaj senĉesa sinsekvo de leviĝomalleviĝo. Ne mankas melodio en tio, se oni enpense rigardas la ludeman flugon de la mevoj kaj la gracian silueton de pufitaj veloj, antaŭ la malproksima strio de la horizonto, kiu logas, tentas kaj promesas dumnokte, kiam la luno ĝin arĝentas. Nu, finon mi devas meti el mia vortŝprucado, se spacon mi volas lasi al la rakonto de mia ĵusa legado. Aŭskultu do, ĉar jene mi komencas:

Honoran lokon mi donas al du novaj vizitantoj: SCIENCA RONDO estas fakgazeto por fiziko, kemio, medicino kaj biologio; ĝi estas multobligita revuo, sed aranĝita laŭ tiel perfekta procedo, ke ĝi estas la plej bela multobligaĵo, kiun ĝis nun mi vidis; eldonas ĝin la delegitejo por Germanio de la Internacia Scienca Asocio Esperantista; la enhavo, kvankam scienca, estas frande legata de ĉiu mezinstruita persono, jen do vere laŭdinda celo: alproksimigi la sciencon al la popolo, por interesigi ĝin pri la temoj plej gravaj kaj seriozaj; oportunaj desegnaĵoj kaj klaraj fotografaĵoj ilustras la tekstojn, mi ne alion povas fari al simple transskribi kelkajn titolojn de la enhavo-tabelo: Moderna Astronomio, La anomalio de la akvo, Laborpartigo en la vivo de la Naturo, Pri la bestaj lingvoj, Kemia Terminaro, k. t. p. Mi salutas la viziton de tiel utila kolego; kaj sekve mi prezentas la duan vizitanton, ĝi estas HELENA ESPERANTISTO, veterana dumonata organo de la greka Asocio, kiun oni ne vidis en nia lando jam de antaŭ multe da jaroj, ĉie en tiu gazeto oni vidas la manon de la konata samideano Anakreon Stamatiadis, kiu, kiel kuracisto, aperigas ankaŭ sciencan artikolon pri la efiko de kuirita besta hepato, kiel parto de nutraĵo; plia artikolo sub tikla titolo «Esperantofobio» estas interesa kaj aktuala, interne de niaj rondoj. Plej grandan parton de la gazeto okupas propagandaj artikoloj en greka lingvo; kun granda respekto oni vidas kortuŝe, ke la saĝa lingvo de la plej antikva okcidenta civilizo povis postvivi por defendi la rolon de nia moderna lingvo, en la internaciaj rilatoj de la nuna tempo. La skandinavaj landoj aperigas akurate siajn gazetojn: la sveda ESPERANTO-TIDNINGEN donas kuriozajn detalojn pri la esperantaj disaŭdigoj en la sveda radio. NORVEGA ESPERANTISTO aperigas belegan

priskribon pri Lofthus, plej bela loko en la okcidenta Norvegio, kie okazos la somera esperantista ferio. En ĝia rubriko por novaj gazetoj aperas laŭda mencieto por nia bulteno. DANSK ESPERANTO-BLAD publikigas du bonajn raportojn pri vojaĝoj al Francio kaj Bulgario; mia estimata amiko Paul Thorsen estis oficiala gasto inter la esperanto-brigadistoj, kaj tre bone li memoras pri ilia ŝatata devizo: «Ni konstruas la digon, la digo konstruas nin!» La dua numero de MALGRANDA REVUO aperas tiel bela, kiel la unua; krom kelkaj tre gravaj artikoloj, estas interesa rubriko sub titolo «Lingvaj Sugestoj», kie oni klarigas detale la korektan uzon de diversaj vortoj. En FRANCA ESPERANTISTO oni tiel skribas pri «Abundismo»: «Post longa periodo de ĝenerala manko, abundo iom post iom revenas, kaj jam reaŭdiĝas plendoj pro malfacila vendo kaj tro malaltaj prezoj. Denove la publiko interesiĝas pri la movado konata sub la nomo de Abundema Ekonomio. Fakte la grandega plimulto el la homoj estas viglaj abundemuloj. Krom malgranda, tute sensignifa nombro da asketoj, ĉiuj homoj preferas abundon al manko kaj saton al malsato.» El la raporto de la ĝenerala sekretario, oni konkludas, ke nia lingvo en la najbara lando bone progresas sub sperta gvido. Oni devas jam scii, ke la Universala Kongreso de 1950 okazos en Parizo, kie nunjare okazos baldaŭ tiu de SAT; pri la proksima soleno SENNACIULO donas lastajn informojn. En Junulara Angulo, parolante pri edukado, oni diras: «Se oni demandas best-dresiston, kiamaniere oni plej sukcese dresas bestojn, tiam certe li ne respondos: per fortaj batoj! Tio fakte ne estas novaĵo, kaj konvinki homojn pri tio estas facile.» En aparta rubriketo oni recenzas amikece nian bultenon, kaj eĉ oni represas kelkajn fragmentojn el la marta numero. Plaĉa aspekto de LA PRAKTIKO estas ekstera ornamo por treege valora enhavo de la lasta numero, kie troviĝas longa raporto kun abundaj bildoj pri la grava sukceso, kiun atingis en Nederlando la unua Esperanto-elsendo per televido, kun tre favora eĥo ĉe la publiko. En la ĉarma lando de la tulipoj kaj bongusta fromaĝo, pompe rangas kaj floras nia movado, kiel modelo kaj ekzemplo por ni ĉiuj. De la nederlanda ebenaĵo, mi transiras al la supro de la imponaj svisaj montegoj; SVISA ESPERO sin garnas per nova vesto, pri kio ĝi mem jene diras: «Kia strangaĵo estas tiu presmaniero, ĉar nek multobligo nek presigo. Jen do fotokopiado! La sistemo por tiu, kiu ne kontentiĝas per multobligado kaj ne estas sufiĉe riĉa por presigi sian informilon. Mi saltas nun en la danubajn landojn, kie INTERNACIA KULTURO estas aroga standardo; tra ĝiaj 32 paĝoj, kun densa teksto, paradas bone elektitaj literaturaĵoj per flua kaj korekta lingvaĵo, kiu atestas pri la fervora sindonemo kaj kompetenteco de la tieaj amikoj, kiuj respondecas pri ĝia redaktado. La Praha revuo ESPERANTISTA venis al ni kun afablaj privataj salutoj; ĝi dediĉas al nia bulteno longetan recenzon, kun aparta mencio al mi mem. Estu certaj tiuj ŝatataj samideanoj, ke iliajn ĝentilajn vortojn sincere mi reciprokas. Mi ne volas fini sen aludo por la Materialoj de Bulgara Sekcio de Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio; akurate ĝi dissendas adekvatan materialon, por publikigo en ĉiutagaj ĵurnaloj, post koncerna traduko.

Laciĝis la okuloj pro tiom da legado, sed ne tute mi restas kontenta, ĉar plene mi konscias, ke nur mi donis al vi fuŝan informon, kiu, se efika por veki soifon, tamen ne kapabla por liveri la freŝan akvon, kiun via delikata palato postulas. Estu indulgemaj kaj komprenu, ke mi ne kulpas; se nia bulteno estus pli ampleksa... ho, tiuokaze ĉi tiu spirita manĝaĵo estus libera je la kuponoj de porciigado, kiu nun tiel rigore limigas la fantazion kaj detruas la revojn, pri kiuj la koro fabelis, aŭdante la brueton de la ondoj, kaj rigardante la strion de la horizonto, kiun la luno komencas poluri per reflektoj el arĝento, kiel simbolo de pureco en la interligo, kiun Esperanto starigis inter via komplezemo kaj la bona volo de

LA LEGEMA KOBOLDETO

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● ALEMANIA.—El ministerio de Instrucción Pública de Würtemberg ha asignado una subvención para que se enseñe el Esperanto en las escuelas públicas, según decisión tomada el 3 de Marzo pasado. Con esta determinación se acentúa la tendencia a la protección del Esperanto en Alemania, en donde, aun sin aquella, se extiende rápidamente el uso de la lengua internacional.

Con motivo del Congreso Esperantista Alemán, que ha tenido lugar en Götingen, y del que tenemos noticias de haber tenido un éxito asombroso, ha funcionado un servicio postal especial, y se ha editado un sello para los servicios del Congreso.

● BRASIL.—La Sociedad Esperantista de Porto Alegre (Río Grande do Sul) ha recibido, para sus fines de enseñanza, subvenciones de la Municipalidad y del Gobierno de la Provincia. El Brasil, país de aluvión humano, es un buen crisol en el que se funden las diferencias raciales y se comprende mejor la necesidad de un idioma auxiliar neutral.

Como en años anteriores para la ciudad de El Salvador, el Instituto Brasileño de Geografía y Estadística, ha editado un portfolio de fotos de la gran ciudad Sao Paulo, con acotaciones en portugués y Esperanto. Se puede solicitar, gratuitamente de ese Instituto, a Río de Janeiro.

● GUATEMALA.—En la pequeña república centro-americana se ha dado un curso de tres meses para la enseñanza del Esperanto, en la Facultad de Humanidades. Los estudiantes han tenido que cursar sin libros, por falta de material adecuado. Esto es muy lamentable, aunque de rechazo indique la superioridad del Esperanto sobre otros idiomas, que no podrían ser enseñados sin libros.

● SUIZA.—El periódico suizo «Du und Wir», publica habitualmente un artículo sobre Esperanto, con el título «Esperanto-Angulo».

● VATICANO.—Según Radio Vaticano, el programa del Año Santo (1950) será radiado también en Esperanto, y, entre las solemnidades que tendrán lugar en Roma, figurará el congreso internacional de católicos esperantistas.

● HOLANDA.—La revista técnica semanal «De Ingenieur», ha publicado un interesante artículo en inglés, de J. Giltay, sobre «Teorema sobre sistemas ópticos con refracción cilindrica concentrada» con un resumen en Esperanto.

● AUSTRIA.—La Oficina de Turismo de Austria, comprendiendo la importancia que va adquiriendo el Esperanto para las cuestiones internacionales, ha establecido una Sección de Esperanto en su organización. Siendo Austria un país ideal para el verano, se intenta establecer una estación para esperantistas, y una organización para esquiar en el Tirol, con instructores esperantistas, así como hoteles en los puntos más típicos, con personal esperantista. Esta decisión es de una importancia que no necesitamos hacer resaltar. Todos aquellos que quieran felicitar al «Austria Trafikoficejo» Esperanto-Sekcio, Friedrichstrasse, 7 Wien I Austria, recibirán en contestación un bonito prospecto de Austria, franqueado con el nuevo sello en Esperanto que acaba de ser puesto en circulación.

● NORTEAMERICA.—«American Collectors Exchange», ha decidido nombrar oficialmente un perito traductor esperantista. Hasta en Norteamérica, el país menos propicio al desarrollo de la lengua internacional, se va aceptando la idea de que con el inglés no basta...

Uno de los compañeros del almirante Byrd en la exploración a la Antártida, el sabio Dr. Herbert Howe, especialista en magnetismo terrestre, ha comenzado el estudio del Esperanto, pues, según manifiesta a su Oficina Central: «En mi trabajo, me estorba constantemente la necesidad de tener que usar diversas lenguas. Tengo el convencimiento de que el Esperanto puede anular ese problema». En el pasado mes de Febrero, el Dr. Howe dió una conferencia sobre Esperanto a sus colegas del Laboratorio Geodésico de la fundación Carnegie.

● **ITALIA.**—El tercer congreso italiano para el Movimiento Federalista Europeo, que tuvo lugar en Florencia durante el mes de Abril, reconociendo que el uso del Esperanto es necesario para las relaciones internacionales, ha aprobado una resolución recomendándole para los fines de su asociación.

● **POLONIA.**—En el aula del Monopolio Polaco del Alcohol, en Cracovia, el profesor M. Sygnarski dió una conferencia sobre el Esperanto, ante un auditorio de más de 350 personas, de las cuales un gran número se inscribieron para un curso de enseñanza de la lengua auxiliar.

● **HUNGRIA.**—Más de 250 ferroviarios húngaros toman parte en las clases de Esperanto que ha organizado la Administración de Ferrocarriles de Hungría.

● **EN EL MUNDO ENTERO** se extiende cada vez más el Esperanto. Muchos Estados lo adoptan paulatinamente en sus escuelas y universidades.

Muchas empresas comerciales, de aviación y turismo lo emplean para su propaganda y correspondencia. La radio lo utiliza cada vez más. Ser esperantista ya no es ser un maniático, utópico o anormal. Y lo que hoy se cree todavía romántico será considerado en un futuro que ya se vislumbra, como lo más práctico y positivo posible. Por eso, aprenderlo es un recreo útil y... utilitario.

ESPERANTO EN TARRASA

Sub tia titolo aperis en la gazeto "Tarrasa" jena raporto pri la festoj laste okazigitaj, en sia sidejo, de niaj aktivaj samideanoj el Tarrasa, la bela industria urbo apud Barcelono.

La Esperanto-Sekcio de la *Flora Asocio* «Tarrasa Junularo» organizis agrablan kunvenon por soleni la finiĝon de la kurso 1948-49. Kun frata spirito sidis por kunmanĝi ĉirkaŭ 40 personoj, junaj kaj maljunaj, apartenantaj al la Zamenhofa lingva idealo. Je la fino multaj el ili paroladis; kaj, inter la vortoj diritaj, brilis pro sia elokvento la paroloj de la veteranaj esperantistoj S-roj Valentín Alavedra, Sebastián Chaler kaj Mariano Solá. Tiu laste menciita faris belegan diskurson en Esperanto, Apartan mencion meritas la nova kaj entuziasma esperantisto S-ro Luis Sorribes, kiu je nomo de ĉiuj lernantoj esprimis sian dankon, kaj tiun de siaj kunuloj, al la instruisto S-ro Chaler. En la prezidejo de la bankedo sidis ankaŭ S-ro Miguel Rambla, unu el la unuaj esperantistoj de Tarrasa, kune kun S-ro Jaime Gorina kiel reprezentanto de la Komitato de la *Flora Asocio*. La okazaĵo, kiun partoprenis kelkaj sinjorinoj, finiĝis per ĉiuvoĉa kantado de la himno «La Espero», kaj oni esprimis la plej bonajn dezirojn por Esperanto.

Ankaŭ estis inaŭgurata Esperantista Ekspozicio. La muroj de la sidejo estis ornamitaj per la naciaj flagoj de multaj landoj, interplektitaj kun tiu de la verda stelo; kaj, en elstara loko, portreto de D-ro Zamenhof pompis. Ankaŭ la hispana flago aperis kunplektita kun la verda standardo. Multege da afiŝoj anoncantaj kongresojn, specimenfoirojn kaj jubileojn; centoj da poŝtkartoj kaj leteroj, el tridek diversaj landoj, pruvis la nunan potencon de Esperanto, ĉar ĉio ĉi tio konsistigas parton de la korespondaĵoj ricevitaj de la lernantoj ĵus finintaj plensukcese la kurson 1948-49. Libroj, revuoj, turismaj broŝuroj ktp. laŭ nekalkulebla nombro, ĉio eldonita en Esperanto, kompletigis tiel belan demonstracion. La ekspozicio estis vizitata kun plezuro de multege da personoj; inter ili, en akompano de kelkaj Barcelonaj esperantistoj, S-ro Federico Pujulá Vallés, enkondukinto de Esperanto en Katalunio, kiu adresis belan paroladon al la Tarrasaj esperantistoj. La Flora Sekcio, sub gvidado de sia direktanto S-ro Juan Cristóbal, kantis belegajn pecojn, kaj kiel novaĵon ĝi kantis en Esperanto «La Najtingalo», ricevante varman aplaŭdon. Ankaŭ la solisto S-ro Cañadell tre bone diris du kantojn en Esperanto. Prave, la ĵusnaskita Esperanto-Fako povas esti kontenta pro la atingita sukceso de sia kunveno, ĉar ĝi pruvas, ke Tarrasa daŭre estas la avangardo de Esperanto en Hispanio, kun fervora entuziasmo.

BONHUMORA ANGULETO PRI KURACISTO KAJ KLIENTO

Kuracisto: «Vi devas trinki tiun kuracilon antaŭ la tagmanĝo».
Malsanulo: «Bone, sed, kiel mi devas akiri ĝin?».
Kuracisto: «Ĉu la kuracilon?».
Malsanulo: «Ne; la tagmanĝon!»

Kuracisto (emfazante): «Vi devas esti tre danka al mi; ĉar, per la elspezo de unu sola vizito, mi trovis ĉe vi kvin malsanojn!».

Kuracisto: «Ve! Via koro multe malsaniĝis pro malordigita ritmo! Tio estas grava afero por vi!».
Kliento (konsternita): «Nu, kion vi aŭdas en mia brusto?».
Kuracisto: «Via korbatado similas al freneza bugi-bugio!».
Kliento (trankvilige ridegante): «Ha! Ha! Tio ne gravas; ĉar ankaŭ mi estas aŭdante ĝin! En la supra etaĝo oni estas dancante ĝin de antaŭ jam unu horo!».

Patrino: Ĉu vi ne opinias, Doktoro, ke via fakturo, por la morbilo de mia filo, estas tro multekosta?
Kuracisto: Tute ne; mi ja vizitis lin dum ses tagoj.
Patrino: Jes, Doktoro; sed ne forgesu tamen, ke li infektis ĉiujn ceterajn kunlernantojn!

Malsanulo, konsultante al fama ĥirurgo, tiel demandis: «Ĉu mi, post tiu operacio, povos labori?».
—Certe!—respondis la kuracisto.
—Bone, do; tio jam ne interesas!

DRO. CIRANO

GRAVA ATENTIGO

Pro somera libertempo de la redaktoroj, dum monato Aŭgusto nia bulteno NE aperos. La proksima numero estos eksterordinara, kun dekdu paĝoj da elektita kaj densa enhavo; sed ĝi ne aperos ĝis mezo de Septembro. Bonvolu, do, zorge atenti pri tio!